

# テロルの縁起

## *Laŭkondiĉa Estiĝo de Teroro*

山口真一 / Yamaguti Sin'iti

2001年9月11日、アメリカ合衆国で同時多発テロ事件が起きました。航空機がマンハッタン高層ビルへ衝突し、ビルが崩れ落ちていく様子が、全世界に衝撃を与えました。当時の理事長だった佐村隆英師は「恨みは恨みによって止むことなし」として、法句経の一節を引用しつつ「地球市民よ、国家・宗教・民族を越えて、ザメンホフ博士の願いである人類人主義に立とうではないか」と呼びかけられました。(本誌314号)

しかし事態は、その願いとは逆の方向に進んでしまいました。アメリカ軍はその報復として、アフガニスタン紛争、イラク戦争をしかけたのです。「テロには屈しない」とのスローガンを打ち立てながら。

同時多発テロを実行したイスラム過激派「アルカイダ」を生んだのは、実はアメリカ自身でした。アフガニスタンへのソ連侵攻に対抗し、ゲリラ戦を組織するために、アメリカ中央情報局(CIA)やパキスタンが「ムジャヒディン」(イスラムの聖なる戦士たち)に武器、弾薬、資金、軍事訓練を与えて、それがのちの「アルカイダ」になりました。アルカイダの戦闘力はアメ

La 11-an de septembro 2001 okazis serio de teroristaj atakoj en Usono. Aviadiloj sinsekve impetis kontraŭ konstruaĵoj de Manhatano, kiuj disfalis. La sceno donis al la tuta mondo grandan ŝokon. Samura Ryuei, tiama ĉefdirektoro de JBLE, citante versojn el "Dhammapada" emfazis ke venĝemo ne ĉesas per satigo de venĝemo, kaj alvokis jene: "Ni terglobaj civitanoj stariĝu sur homaranismo, la deziro de d-ro Zamenhof, trans ŝtatoj, religioj kaj nacioj. (n-ro 314)

Sed la afero iris al la mala direkto. La usona armeo entreprenis la militojn en Afganio kaj Irako por venĝi la atakojn kun la slogano "Ni ne estu venkita de terorismo."

Verdire Al-Kaida, kiu organizis la serion de teroristaj atakoj, estis naskita de Usono mem. Por kontraŭi Sovetunion, kiu invadis Afganion, CIA (Centra Informokapta Agentejo) de Usono kaj Pakistana agentejo provizis Muĝahedinojn, batalantojn por sankta Islamo, per armiloj, municio, mono kaj trejnado pormilita. Ili poste faris la grupon nomatan Al-Kaida. Ĝia batalkapablo estas formita

リカが要請・養成したものだのです。アメリカにとっては、アルカイダが後に自分に歯向かうようになるとは想定していなかったのですが、イスラム社会の中では、反イスラエル・反米・反西欧感情がもともと渦巻いていました。

歴史をたどるならば、第一次大戦終了後、ヨーロッパ社会は植民地主義的にオスマン帝国を分割占領し、イスラエルを建国、そしてアメリカは石油利権の確保のため、イスラム社会を勝手気ままに解体してきました。複雑なパレスチナ問題がここから始まりました。9.11同時多発テロは、したがって、故なくして生じたものではありません。テロを根絶するためには、その原因を十分に研究する必要があったのですが、自らを正義の代表と認識していたアメリカにとって、自国に反対する力はすべて悪であり、テロの支援者であることになってしまいました。

イラク戦争において、どれほど大勢の民間人が無差別攻撃の犠牲者となったことでしょうか。正確な数は分かっていませんが、死者50万人から65万人のうち、7割が民間人であるといわれています。

今年11月13日、パリ同時多発テロでは130人が亡くなりました。罪のない人を殺害する行為は断固として非難されねばなりません。しかしその一方、イラクにおいて罪なき数十万人が殺害されたことに、世界はあまりにも無関心できたのではないのでしょうか。

kaj postulita de Usono. Usono supozeble ne antaŭkalkulis, ke Al-Kaida poste minacos Usonon per dentegoj. Sed en la islama socio dekomence nestis la etoso kontraŭ Israelo, Usono kaj Eŭropo.

Se ni retrorigardas la historion, ni vidas: post la fino de la unua mondomilito la eŭropa socio koloniisme dividis kaj okupis Otomanan Imperion, fondis Israelon, kaj Usono por enmanigi rajtojn pri petrolo arbitre dispartigadis la islaman socion. La komplika problemo rilate Palestinon ĉi tie komenciĝis. Tial la serio de teroristaj atakoj de 9.11 ne okazis senkaŭze. Por ekstermi teroron oni bezonis sufiĉe studi la kaŭzojn. Sed por Usono, kiu sin rigardas kiel la reprezentanton de justo, ĉiuj kontraŭantaj fortoj fariĝis por ĝi malbonaj ekzistoj kaj subtenantoj de teroroj.

Kiom multe da civitanoj fariĝis viktimoj de sendistinga atako en Iraka milito? Oni ne scias ekzaktan nombron sed supozas, ke el 5 aŭ 6.5 cent mil mortintoj 70 procentoj estas civitanoj.

En tiu ĉi jaro la 13-an de novembro mortis 130 homoj pro la serio de teroristaj atakoj de Parizo. Devas esti severe kritikitaj la agoj murdi senkulpajn homojn. Sed aliflanke la mondo estas tro indiferenta por tio, ke cent miloj da senkulpaj homoj estis mortigitaj en Irako.

本誌375号にも書きましたが、ある戦場カメラマンのお話を聞いたことがあります。ファルージャで、無実の父親を殺された少年の目つきが憎悪に満ちたものだったこと。このような少年少女が数十万人いて、彼らの中から明日のテロリストが生まれてくるのだ、と。これが憎しみの連鎖です。

一方的にイスラム過激派を悪として武力攻撃すればそれで事態は改善に向うでしょうか？「対話など通用する相手ではない」という意見が多数であるとは思いますが、武力攻撃することでテロリストが減るでしょうか。現実の歴史は、まさにその逆であることを証明しているのではないのでしょうか。今またシリアへの空爆により、パリでの犠牲者以上の犠牲者が生まれています。シリア国民の命はフランス国民の命よりも軽いのでしょうか。イラク国民の命はアメリカ国民の命よりも軽いのでしょうか。いや、すべて人間の命は、国籍や民族に関わりなく尊い、これが仏教の教えでありザメンホフの願いだったはずです。

仏教では、ものごとにはすべて原因があると教えています。その原因を取り除かない限り、事態の解決にはなりません。そして瞋恚によって平和がもたらされることはありません。このことを、私たちは世界に訴え続けねばなりません。「単純な理想論だ」と笑われても、理想主義以外の方法で問題を解決することはありえないのですから。

Kiel mi jam skribis en la 375-a numero de tiu ĉi bulteno, iam mi aŭskultis la prelegon de iu fotisto de batalkampo. Li parolis pri la knabo, kies senkulpa patro estis mortigita en Faruĝa. Liaj okuloj estis plenaj de malamo. Tiaj knaboj kaj knabinoj troviĝas da cent miloj, el kiuj naskiĝos estontaj teroristoj. Jen la ĉeno de malamo.

Ĉu la afero iras al pli bona direkto, se ni atakas per armita forto islamajn ekstremistojn kiel malbonulojn? Multaj opinias, ke dialogo kun ili tute ne validas. Sed ĉu atako per armita forto povas malmultigi teroristojn? La efektiva historio pruvas la malon. Nun pro la aeratako en Sirio estas naskiĝantaj pli da viktimoj ol tiuj en Parizo. Ĉu la vivo de sirianoj estas malpli peza ol tiu de francoj? Ĉu la vivo de irakanoj estas malpli peza ol tiu de usonanoj? Ne. Vivo de ĉiuj homoj havas egalan valoron senrilate al ŝtato, nacio aŭ gento. Tio devis esti la instruo de budhismo kaj deziro de Zamenhof.

Budhismo instruas al ni, ke ĉiuj aferoj havas siajn kaŭzojn. Se oni ne forigas kaŭzojn, oni ne povas solvi la problemojn. Kaj kolero neniel alportas pacon. Tion ĉi ni devas diradi al la mondo, eĉ se multaj eble rikanas al la opinio, dirante ke ĝi estas simpla idealismo. Sed la problemoj ne povas esti solvitaj per aliaj rimedoj ol idealismo.